# Esperanto en Danio

**20-a jarkolekto • n-ro 2 • majo 2013**

ESPERANTO 2013

Justa komunikado

**Esperanto en Danio**
membroorgano de
Dana Esperanto-Asocio

ISSN 0909-6124

**Adreso de la asocio/prezidanto:**
Ileana Schrøder
Vestavej 4, 2770 Kastrup
☎ 32 51 31 16 dea@esperanto.dk
Ĝirokonto: 1551-805 7370
UEA-kodo: deaa-t

**Kromaj estraranoj:**
Arne Casper Mortensen (kasisto)
Finn Østerbæk (vicprezidanto)
Jens S. Larsen (sekretario)
Bent Jensenius
Peter Wraae

**Redakcia adreso:**
Jens S. Larsen
c/o Trillingsgård, Munkebjergvej 77
2770 Kastrup
☎ 52 64 44 72 eed@esperanto.dk

**Presado:**
DDFO

**Adresŝanĝoj al:**
La prezidantino (adreso supre)

Represo de artikoloj el EeD estas permesata kun indiko de la fonto.

Limdato por la venonta numero:

**15.08.2013**

## Enhavo

**Danko kaj bonvenigo**.......................3

**Jarraporto 2012**.................................4
  **Eksteraj rilatoj**.................................5
  **Informado**.......................................5
  **Jarraportoj de la Kluboj**....................8
  **Raporto al fonduso Cigno**..............12

**Paperaj gazeteltondaĵoj**.....................13
**Kalkulaĵo de DEA 2012**......................14

**Programo de KEK**..............................15

**Notico el Togolando**...........................16
**Skisemajno 2013 en Aŭstrio**.............17
**Lillo gastigos la 100-an UK**...............18
**Decembro en Bona Espero**...............18

**Esperanto-sumoo**...............................21
**Esperanto ĉe Monda Socia Forumo**.22

**Esperantistoj ordenitaj**......................23
**Senata Ekspozicio en Pollando**........23

**Vojaĝo Angkor-Esperanto**.................25
**La Famaj vizitindaĵoj de provinco Siem Reap**.........................................27

# Danko kaj bonvenigo



Dum la ĝenerala kunveno de KEK okazis ŝanĝo de prezidanto: Betty Chatterjee rezignis kaj Peter Wraae estis elektita nova prezidanto de KEK. Ĉi tie mi volas tutkore danki al Betty por ŝia entuziasma agemo du 6 jarojn kiel prezidanto de nia plej granda klubo. La tasko ne estis facila, tamen ŝi ĉiam instigis kaj inspiris nin pere de sia personeco kaj sukcesis doni al ni multajn belajn travivaĵojn pere de la varia lunda programo de KEK.

Certe ne estas facile daŭrigi tiun taskon, sed feliĉe ankaŭ la novelektita prezidanto Peter Wraae estas entuziasma kaj agema persono, kaj mi certas ke ankaŭ li plenumos la taskon. Mi kaj la estraro de DEA ankaŭ tutkore bonvenigas lin! Danio estas bedaŭrinde unu el la landoj kie disvastigo de Esperanto estas peza tasko, kompare al pluraj aliaj landoj ekster Eŭropo. Oni povas kelkfoje envii la sukcesojn en tiuj landoj, kie la angla lingvo estas tro malfacile lernebla, kaj kie homoj pli rapide rekonas la taŭgecon kaj facilecon de nia lingvo. Ni devas uzi multe pli da energio kaj persistemo por akiri rezultojn, sed ni ne ĉesas semi kaj semi…

Unu el la gravaj taskoj de DEA estas fariĝi pli kaj pli videbla. Tial la estraro decidis ke DEA ankaŭ ĉi-jare partoprenos en la Librofoiro en Bella Centro. Kiel membroj de KUKS, la ombrela organizo pri asocioj de amikeco inter Danio kaj aliaj landoj, ni certe estos invititaj al festado de la 24-a de oktobro, kiu estas la Tago de Unuiĝintaj Nacioj. Tie ambasadoj de multaj landoj prezentas bongustaĵojn de siaj landoj kaj dum la vespero okazas festivalo kun popoldancoj kaj muziko. Kiam ni ricevos invitilon, eble jam en junio, ni informos niajn membrojn pere de Novaĵletero.

Sed de nun ĝis venonta eldono de la revuo pluraj el ni antaŭĝojas renkonti multajn aliajn geamikojn, kelkaj el ni dum SES en Slovakio kaj aliaj dum la UK en Rejkjaviko, kie partoprenos 22 danoj. Unuopuloj certe partoprenos en aliaj internaciaj aranĝoj, kaj ĉiuj estas bonvenaj sendi al nia redaktoro impresojn de siaj travivaĵoj. Mi deziras al ĉiuj niaj membroj agrablan someron!

*Ileana Schrøder*

# Jarraporto 2012

La jaro 2012 estis rimarkinda pro la 125-jara jubileo, evento kiu spronis ne nur nian asocion. Ĉie en la esperanta movado oni rimarkis viglan agadon. Jam pasintjare ni informis pri la elstarigo de internacia laborgrupo por kunordigo de la projekto 125. Ni plenumis la strategian planon kiun ni sendis al la kunordiga laborgrupo. Pri nia kontribuo rilate al gazetaraj komunikoj kaj cetera informado, interalie pere de partopreno en diversaj aranĝoj, ni sendis raporton al Fonduso Cigno, starigita por premii la plej elstaran agadon pri informado ene de EU (vidu apartan raporton).

Dum la jubilea jaro 125 DEA partoprenis en diversaj aranĝoj:

En februaro kiel kutime ni partoprenis en la foiro **Krop-Sind-Ånd** en la Falkoner-Centro kun libroekspozicio kaj informa materialo. Sekvis partopreno en la aranĝo “**Kultura haveno”** kie la muzikgrupo Espo Despo sukcese koncertis antaŭ multnombra publiko, kaj la publike tre sukcesa festivalo ”Gustumu la mondon” – **”Smag Verden”** organizita de la Komunumo de Kopenhago komence de septembro, kie ni havis budon kaj havis kontakton kun multaj interesitoj, kaj kie denove koncertis Espo Despo. En novembro DEA partoprenis en la **Librofoiro** en Bella Centro, kie la jubilea simbolo estis prezentita 5400 fojoin dum la 3-taga aranĝo. Nia partopreno inspiris la danan radion P1 okazigi intervjuon kun nia membro Peter Wraae pri la esperanta literaturo.

Ni daŭre strebas esti pli videblaj al la ekstera mondo, partoprenante en diversaj aranĝoj. Tial la 21. de septembro DEA estis kunaranĝanto de konferenco okaze de la ”Tago de Paco” kies titolo estis “La Afganaj virinoj – ĉu ŝlosilo de daŭrigebla paco?”. La konferenco estis ege sukcesa kun partopreno de pli ol 150 personoj. La temo estis tre aktuala, kun la partopreno de la Ministro pri Evoluo. La kunaranĝantoj estis: Center for Konfliktløsning, Demokrati i Europa, RIKO (Rådet for International Konfliktløsning) Kvindefredsligaen kaj la Biblioteko de la Kulturdomo. Ni esperas daŭrigi tiun kunlaboron.

En januaro ni partoprenis laborkunvenon en Edinburgo pri Grundtvig projekto, pagita de la dana agentejo, por pridiskuti la eblecon de kunlaboro kun aliaj esperantaj asocioj ene de la projekto Grundtvig. Ni sendis la

petskibon en februaro kaj atendas ricevi respondon en julio 2013. La temo de la projekto estas profesiigo de niaj organizoj, kaj la seminarioj okazos en la landoj de la partoprenantoj de la projekto. Entute 12 asocioj partoprenas en tiu projekto.

Unu el la malĝojaj travivaĵoj de la jaro estas la sperto de grava perdo: forpasis 2 elstaraj esperantistoj de la dana movado: Bodil Kühlmann, honora membro de KEK kaj la tre aktiva membro, kaj fondinto de la Unuiĝo de Næstved Henning Olsen. Pro tio la Unuiĝo de Næstved fine de la jaro 2012 decidis malfondi sin pro manko da fortoj kaj personoj kiuj povus transpreni la taskojn, kiel oni povas legi en la lasta raporto de la Unuiĝo. Pluraj membroj de la Unuiĝo fariĝis individuaj membroj de DEA, sed estas grava perdo por nia movado ne plu havi videblan agadon en Næstved.

Fine mi volas danki nian estrarojn kaj ĉiujn membrojn pro ilia fidela apogo al nia agado.

## Eksteraj rilatoj

DEA partoprenas regule la kunvenojn de la reprezenta komitato de la UN-Asocio. Ni estas membro de KUKS, la ombrela asocio de danaj kaj alilandaj kulturaj asocioj. Ĉi-jare ni havas kontakton kun la ombrela organizo NETOP, reto de klerigaj asocioj pri eventuala membriĝo de niaj kluboj, kaj kun Fredsministeriet, nove fondita ombrela asocio de la paca movado.

## Informado

### Esperanto en Danio

La revuo Esperanto en Danio aperis 5-foje dum la jaro 2012, sed la estraro decidis aperigi la revuon nur 4 foje en 2013 precipe pro la poŝtelspezoj.

### Informa materialo

Ni eldonis novan broŝureton “Esperanto lingvo internacia” kiu informas en facila maniero pri la lingvo. Ni uzas ĝin precipe dum nia partopreno en foiroj.

## Fejsbuko

La fejsbukan paĝon "Amikoj de la Dana Esperanto-Asocio" prizorgis ege lerte Betty Chatterjee, kiun ni dankas pro ŝia akcepto daŭrigi tiun agadon.

## Prelegoj

La prezidanto kaj vicprezidanto prelegis autune pri nia lingvo dum duontaga kunveno en la firmao Dako, invititaj de la estro de unu el la sekcioj.

## Gazetartikoloj

*Raportas Jens Stengård Larsen*

Dum 2012 Esperanto estis menciita en danaj amaskomunikiloj entute 106 fojojn, kiuj inkluzivas la okazojn kiam oni hazarde komparas kun ĝi ion komunan aŭ strangan. La plej grava el la mencioj certe estis la radia dissendo "La revo pri monda lingvo" en P1 la 3-an de februaro, kiu estis 50-minuta intervjuo de Poul Friis al Robert Phillipson. Jyllands-Posten havis la 20an de januaro artikolon okaze de la 125-jariĝo, kaj tio donis la okazon reagi per leteroj de legantoj. Pensige estas ke tiu gazeto respekte traktas Esperanton en la normalaj artikoloj, sed mokas ĝin en la satira kolumno "Hjørnesparket" (17/2 kaj 10/7). Ankaŭ en la popularscienca revuo "Illustreret Videnskab" la 19an de julio aperis projubilea artikolo, al kiu estis reago en la sekva numero, kaj la 12-an de aŭgusto estis en "Nordjyske Stiftstidende" intervjuo al Anette Holck, violonĉelistino de la simfonia orkestro de Aalborg.

Kiel kutime, estis nombro da nekrologoj kaj artikoloj pri multjariĝo de esperantistoj. La plej menciindaj tiurilate estas la 80-jariĝo de la fama astronomo Erik Høg kaj la forpaso de la multjara aktivulo Henning Olsen, kiu nur tri monatojn antaŭe sukcesis enpresigi grandan artikolon pri sia Esperanto-laboro en Sjællandske Næstved.

Krome estas interese ke eblas reklami por Esperanto 59 jarojn post sia morto. Thor Ipsen estis populara aŭtoro kaj etvendisto en la regiono de Bording, meza Jutlando – kaj entuziasma esperantisto. Unu el liaj tiam infanaj amikoj nun prizorgis la starigon de memorŝtono pri li, kaj pri tio vaste raportis pluraj mezjutlandaj gazetoj.

Fine, pri Vikipedio estis menciite ke ĝi havas Esperantan version... sed

ankaŭ ke ekzistas versioj en Volapuko kaj Ido, bedaŭrinde. Nepras tiurilate atentigi ke la Esperanta Vikipedio estas samnivela kun la dana, kvante kaj kvalite.

## LibroServo

*Raportas Arne Casper*

Post la Universala Kongreso en 2011, la vendado en 2012 denove iomete normaliĝis, sed estas ĉefe koncentrita al nia lernolibro *Esperanto den direkte metode* de Stano Marček kaj niaj vortaroj *Esperanto-Dansk* kaj *Dansk-Esperanto.* La intereso pri esperanta literaturo estas ege limigita. Nia Revu-Servo bedaŭrinde ankaŭ malkreskas en 2012.

"Plibonigo de via esperanta scio komencas kun legado"

## Ĉefdelegita laboro

*Raportas Arne Casper*

Bedaŭrinde ni spertis konsiderindan malkreskon de individuaj membroj de Universala Esperanto-Asocio UEA en 2012. La fina nombro en 2012 estis 91, kompare al 103 en 2011. Nekontentige, kompreneble, sed neeviteble post la Universala Kongreso 2011 en nia lando.

Ne forgesu, ke "ni estas la fundamento de nia Universala Asocio".

## ILEI

*Raportas Bent Jensenius*

Ankaŭ la jaro 2012 estis rimarkinda por nia sekcio pro la 125-jara jubileo de la eldono de la unua lernolibro. Tio signifis enfokusigon kaj elsendadon de gazetaraj komunikoj pere de nia landa asocio, kio rezultis al pli vigla aliĝo al kursoj kiujn nia sekcio organizas. Dum la tuta jaro 2 el niaj instruistoj instruis 2-nivelajn kursojn: por daŭrigantoj kaj konversacia kurso. En septembro estis aranĝita kurso por komencantoj kun 12 partoprenantoj. En Kolding aliĝis 4 personoj al porkomencanta kurso gvidata de Tove Bak kaj ankaŭ Ålborg daŭrigas sian instruan agadon.

Kune kun nia landa asocio ni organizis la KER-ekzamenon en Kopenhago la 9-an de junio, kie partoprenis entute 8 personoj kiuj sukcese ekzameniĝis.

Ni daŭre instigas niajn membrojn partopreni eksterlandajn kursojn kaj

ekzamenojn. Unu dana membro partoprenis por la dua fojo kurson en Ĉinio.

Por digne reprezenti la lingvon kaj festi la 125-jaran jubileon nia sekcio partoprenis kune kun nia landa asocio ĉe la librofoiro de Kopenhago montrante niajn eldonaĵoin, nome la vortaron dana-Esperantan kaj la lernolibrojn de Stano Marček kaj Bent Jensenius.

La sekcio nombras 18 membrojn.

### DEJO

Bedaŭrinde la membronombro de DEJO pli kaj pli malkreskas, eĉ se oni daŭre partoprenas en la Festivalo de Roskilde.

## Jarraportoj de la Kluboj

### Konversacia Esperanto-Klubo, Kopenhago

*Raportas Betty Chatterjee*

Unue mi volus prezenti al vi la faktojn pri la dumjara agado de la klubo.

Ni klubkunvenis 45 fojojn, kaj la programo inkludis:

- prelegojn
- konversaciajn rondojn pri multaj diversaj temoj.
- studgrupojn
- kvizvesperon
- Esperanto-doman vesperon
- DEA-vesperon
- junularajn vesperojn
- diversajn ekskursojn
- skajpo-konferencajn vesperojn kunlabore kun la Esperanto-klubo en Kaburbo kaj Katalin Kováts kaj ŝiaj familianoj.
- kunlabore kun DEA kaj Fonduso por Esperanto-domo 35 esperantistoj vigle festis okaze de la Zamenhofa tago.

Detalaj informoj pri la aranĝoj legeblas en la numeroj de Ponto kaj Esperanto en Danio de 2012.

Aliaj menciendaj faktoj estas:

La membraro daŭre malkreskas; en la jaro 2008 KEK havis 72 membrojn,

en la jaro 2011 60 membrojn kaj en la jaro 2012, 52 membrojn. Nia honora membro Bodil Kühlmann forpasis en aŭgusto kaj Henning Olsen forpasis en oktobro. Malgraŭ la fakto, ke du trionoj el la nuntempaj membroj estas pensiuloj, ili fidele partoprenas la klubajn aranĝojn, tial samkiel lastjare la ĉeestantaro dum klubaj kunvenoj estas inter 10 kaj 15. Daŭre ni malofte krokodilas kaj niaj konversacioj estas viglaj. 6 KEK-anoj kuraĝis ekzameniĝi dum la mondvasta skriba ekzameno la 9-an de majo, kiu pruvas, ke oni serioze pritraktas la lingvon.

Lastjare mi raportis pri nia intenco plibonigi la intergeneracian kunlaboradon. Mathias Dalmose akceptis la respondecon por la lasta kunveno de la monato. Kelkaj el niaj pli bonaj kunvenoj printempe okazis dank' al lia instigo, kaj venis ankaŭ junuloj. Tamen pro familiaj kaj aliaj kaŭzoj Mathias portempe ne plu respondecas pri 'junularaj kunvenoj'.

Pri la kunlaborado kun la sunda regiono: en 2012 ne okazis kunvenoj kune kun svedoj, tamen ni daŭre kunlaboras pri la eldonado de la revuo 'Ponto'.

Pri la ekskursoj: la lastjara decido aranĝi dumtagajn ekskursojn jam sufiĉe bone sukcesis. Ni vizitis muzeojn kaj ekskursis al Svedio.

Krom la hejmpaĝo esperanto.dk la programo kluba ĉiam legeblas en la fejsbuka paĝo 'Amikoj de la Dana Esperanto-Asocio', kiu havas 201 apogantojn. Plue ĉiu-semajne nome de la estraro mi sendas informon pri la kluba agado retpoŝte al membroj kaj aliaj kontaktoj.

Finfine mi dankas al miaj bonegaj samestraranoj kaj al ĉiuj helpemuloj pro la apogado.

## Esperanto Unuiĝo de Næstved

*Raportas Grete Nielsen*

Kun bedaŭro la jarŝanĝo 2012/2013 signifis, ke la esperanto klubo de Næstved ne plu ekzistas.

Post la morto de E.Henning Olsen la 28-an de oktobro, la restanta estraro decidis okazigi eksterordinarajn ĝeneralajn kunvenojn (2 laŭstatute) por diskuti la estontecon de EUN. Tio okazis la 11-an de decembro kaj montriĝis, ke pli ol du trionoj de la ĉeestantaj 11 membroj voĉdonis por malfondo de la klubo.

La meza aĝo de la membroj estas ĉe ni – kiel en multaj unuiĝoj en Danio –

tre alta, kaj ni vidis neniun eblecon daŭrigi la aktivecojn en digna maniero.

Iomete pri la kluba vivo dum 2012:

La pasinta jaro komenciĝis per studado de la ŝatata libro ”Faktoj kaj Fantazioj”, fine de la jaro ni uzis la relative novan “H.C.Andersen en Oriento”. Henning gvidis tiun studgrupon – ĉiam regis bona etoso. La danlingvaj prelegoj okazintaj dum jaroj finiĝis per vizito de Lene kaj Jan Niemann en marto, tiu estis la lasta de 72. La danaj prelegoj estis unu el niaj iniciatoj interesigi la enloĝantojn de Næstved pri Esperanto. Ni ne vidis iun rezulton, sed ĉiam la lokaj medioj menciis la eventojn.

La somera ekskurso al Holmegård Park fariĝis iomete stranga, ĉar preskaŭ ĉiuj lokoj estis fermitaj. Tamen ni ricevis la menditan manĝon. Kelkajn tagojn poste oni deklaris la tutan entreprenon bankrota.

Henning ekhavis la ideon festi okaze de la 35-jariĝo de EUN. La tago estis la 4-a de aŭgusto, kaj venis entute 16 gastoj, inter ili la prezidantoj de DEA kaj KEK. Lene Niemann reprezentis DEFA. La klubo regalis per malvarma bufedo, tre bongusta.

Okpaĝa kajereto kun priskribo de kelkaj el niaj faroj dum la 35 jaroj – ankaŭ farita de Henning – estis disdonita.

Post novjaro kelkaj jam aliĝis al DEA kiel individuaj membroj, kaj mi certe volos profiti de la mallonga vojo al kopenhagaj aranĝoj. Kelkaj membroj renkontiĝas en Roskilde laŭ interkonsento kun membroj loĝantaj tie.

### Århus Esperanto-klub

*Raportas Stanislaw Mielczarek*

La jaro 2012 ne estis bona por nia klubo. La nombro de klubanoj denove falis. En la jaro 2010 ni havis 28 membrojn, en 2011 – 27 membrojn. Nun ni havas nur 22 klubanojn.

Mortis multjara membro - Hans Halager. Li ripozu en paco!

Jonas Dalmose loĝas sur Fueno kaj pro tio malmembriĝis. Bonŝance ni ekhavis novan membron, nome Marie Holdt. Bonvenon al ŝi!

La partoprenado en la kunvenoj ne estis impona. Pro la disa loĝado de la membroj ofte ni estis 4-6 partoprenantoj. Stanisław Mielczarek daŭrigis

prezentadon de bildoj pri Usono, Erik Hjorth konatigis nin per rakonto kaj fotoj kun Kamboĝo kaj Vjetnamio. En oktobro vizitis nian klubon Liss-Lotte Talbro el Odense, kiu rakontis pri Universala Kongreso 2012 en Vjetnamio.

Somera ekskurso 2012 gvidis nin al la Pluvarbaro de Randers. Malgraŭ tio, ke ni jam vizitis ĝin antaŭ iom da jaroj, la ekskurso estis interesa kaj lerniga. Vizitinda estis ankaŭ la Metia Muzeo (Håndværksmuseum), kie ni povis rigardi diversajn metiojn, ilojn kaj kelkajn metiistojn tie laborantajn.

La 29-an de novembro, post pli ol 30 jaroj en Senior-Centret ĉe Østergade, nia klubo translokiĝis al nova kunvenejo ĉe Carl Blochs Gade. Ĝi situas en la malnova urba muzeo, kiu havas nun nomon Folkestedet, ĉar ĝi funkcios kiel aktivejo por junuloj kaj pliaĝuloj. Ĝi estas sufiĉe ampleksa kun du grandaj salonoj, etaj kunvenejoj, kafejo, kuirejoj ktp. Ĝi estas bona kaj konvena por ni. Per ĉampano ni, 5 klubanoj, inaŭguris tiun novan kunvenejon.

Dankon al vi ĉiuj por bona kunlaboro en la 2012-a jaro kaj ni esperu, ke la kuranta jaro estos bona!

**Nordjutlanda Esperanto-Klubo, Aalborg**

*Raportas Ejnar Hjorth*

Eĉ se 4 de nia membroj transloĝigis al Kopenhago, la klubo en 2012 havis 20 membrojn, do estas minuso de nur 1 membro, kompare de la pasinta jaro. Mi skribis al nepagintoj, por memorigi ilin pri la membreco, sed nur 1 tuj pagis.

Nia plej grava aktiveco estas kursoj. Ni havis 2 nivelojn. 5 novinteresitoj aliĝis al la porkomencanta kurso.

Pro elsendo en la loka radio ni ekhavis la kontakton al la novaj lernantoj. Ankaŭ la jara ekspozicio en Aalborghallen donas al ni okazon informi pri Esperanto.

La jara kotizo estis la sama kiel la antaŭa jaro. La 31-an de decembro 2012 ni havis 7.953 kr. en la banko.

# Raporto al fonduso Cigno

pri la informa agado de la Landa Asocio en Danio dum la jaro 2012

<table>
<tr><th>Dato</th><th>Evento</th><th>Kie</th><th>Speco de informado</th><th>Notoj</th></tr>
<tr><td>15 jan</td><td>Gazeta artikolo</td><td>Jyllands-Posten</td><td>“La plej juna lingvo de la mondo 125-jariĝas”</td><td>Unu el la gravaj danaj tagĵurnaloj</td></tr>
<tr><td>19 jul</td><td>Revua artikolo</td><td>Illustreret Videnskab</td><td>“Kio do okazis … al Esperanto?”</td><td>Popularscienca revuo</td></tr>
<tr><td>30 jul</td><td>Gazeta artikolo</td><td>Herning Folkeblad</td><td>Ipsen parolis 13 lingvoj [titolo en ne tute korekta Esperanto]</td><td rowspan="3">Søren Sørensen el Bording iniciatis starigon de memorŝtono pri Thor Ipsen, stranga sed populara viro kiu mortis trafite de aŭto en 1964.</td></tr>
<tr><td>30 jul</td><td>Gazeta artikolo</td><td>Midtjyllands Avis</td><td>“La bona tago de Søren”</td></tr>
<tr><td>8 aŭg</td><td>Gazeta artikolo</td><td>Ikast Avis</td><td>“Thor Ipsen ricevis memorŝtonon je sia 114-jariĝa tago”</td></tr>
<tr><td>1 aŭg</td><td>Gazeta artikolo</td><td>Sjællandske Næstved</td><td>“Esperanto devus anstataŭi la anglan”</td><td>Intervjuo al Henning Olsen, kunfondinto de la loka klubo</td></tr>
<tr><td>12 aŭg</td><td>Gazeta artikolo</td><td>Nordjyske Stifttidende</td><td>“Survoje al la babela turo”</td><td>Intervjuo al Annette Holck, violonĉelistino de la simfonia orkestro de Aalborg</td></tr>
<tr><td>3 jan</td><td>Radio intervjuo</td><td>Dana ŝtata radio DR P1 50 minuta</td><td>Pri Esperanto kaj la 125ª jubileo</td><td>Intervjuo al Robert Phillipson kaj Ileana Schrøder</td></tr>
<tr><td>26 jul</td><td>Televida intervjuo</td><td>Televida stacioTV 2 10 minuta</td><td>Pri denaskaj esperantistoj okaze de la taga jubileo</td><td>Intervjuo kun Kim Henriksen kaj lia filo Villads Henriksen</td></tr>
</table>

| | | | | |
|---|---|---|---|---|
| 1-3 feb | Foiro | Kopenhago | Ekspozicio | Ekspozicio de libroj, gazetoj,fadfolioj, reklamiloj ktp. |
| 2-4 mar | Foiro | Aalborg | Ekspozicio | Ekspozicio de libroj, gazetoj, fadfolioj, reklamiloj ktp. |
| 3-5 aŭg | Festivalo | Kopenhago | “Kulturhaveno” | Koncerto de Espo-Despo sub la simbolo de la 125a jubileo |
| 1-2 sep | Festivalo | Kopenhago | “Gustumu la mondon” | Ekspozicio de libroj ktp. Kaj varbado por esperantaj kursoj |
| 9-11 nov | Librofoiro | Kopenhago | “Bogforum” | Ekspozicio de libroj kaj varbiloj kun la simbolo de la 125-jariĝo |
| 11 nov | Intervjuo | Dana ŝtata radio DR P1 | Intervjuo pri esperanta literaturo | Intervjuo kun nia membro Peter Wraae |

## Paperaj gazeteltondaĵoj

La programo de Radio Vatikana havis du elsendojn en Esperanto, temas pri la periodo oktobro 2012 ĝis marto 2013.

Februaro, Herlev Bladet: “20 måder at sige ‘Jeg elsker dig’ på”, ankaŭ en Esperanto.

*Grete Nielsen, Bogensevej 37, 1-185, 4700 Næstved.*

# Kalkulaĵo de DEA 2012

| *Indtægter* | *Kr.* | *Udgifter* | *Kr.* |
|---|---|---|---|
| Kontingent klubber | 13.415 | Administration | 11.025 |
| Individuaj | 10.950 | Gebyrer | 300 |
| DEJO | 535 | UEA & EEU konting. | 1.700 |
| Øvrige indt. | 5.613 | Annoncer &reklamer | 2.150 |
| Rente | 3.372 | Arrangementer | 13.643 |
| | | EeD | 10.226 |
| | | Noll Uddannelseskonto | - 2.910 |
| I alt indtægter | 33.886 | | |
| Årets resultat | - 2.248 | | 36.134 |

| *Aktiver* | *Kr.* | *Passiver* | *Kr.* |
|---|---|---|---|
| Obligationer | 85.986 | Egenkapital primo | 151.412 |
| Libroservo | 44.642 | Årets resultat | - 2.248 |
| UEA konto | 2.113 | Egenkapital ultimo | 149.164 |
| Bankindestående DEA | 20.023 | DEJO kapital | 51.584 |
| Bankindestående DEJO | 51.584 | Forudb.kontingent | 3.600 |
| Obligationer Noll | 57.936 | Noll kapital ult. | 57.936 |
| | 262.284 | | 262.284 |
| | ====== | | ======= |

**Ileana Schrøder**
**Formand**

**Arne Casper**
**Kasserer**

**Regnskabet er gennemgået og fundet i orden, den** 16/2-2013

**Tara Gregers**
**Revisor**

**Sven Sandø**
**Revisor**

# Programo de KEK

Ĉiuj kunvenoj de Konversacia Esperanto-Klubo, Kopenhago, okazas en la Kulturdomo, Tomsgårdsvej 35, 2400 København NV, ekde la 19-a ĝis la 21-a horo.
Nova prezidanto kaj kontaktulo: Peter Wraae, telefono +45 6070 7969, retpoŝto peter@wraae.dk

| | |
|---|---|
| 06. maj | Betty Chatterjee mallonge rakontos pri siaj spertoj de 7-a Azia Kongreso okazonta en Jerusalemo ekde la 18-a ĝis la 22-a de aprilo. Mallonge nur, ĉar ŝi preferus respondi VIAJN demandojn. Informoj pri la kongreso legeblas ĉi tie: http://www.esperanto.org.il/ak2013.html |
| 13. maj | Bent Jensenius gvidos studgrupon: legado de noveloj.<br><br>Kiel daŭrigon de nia studgrupo Bent ofertas gvidi serion de legado de noveloj. Dum kelkaj jaroj li instruas kaj ekzamenas homojn ĝuste pri tio. Tamen li klopodos fari la gvidadon ne tro "lerneja". Kiel antaŭkondiĉojn li havas la jenajn: ĉiu novelo devas esti legebla kaj elŝutebla interrete. Interesataj personoj estas bonvenaj sen antaŭa legado aŭ posedo de la teksto. Ĉiu novelo devas esti taŭga por analizo kaj diskuto. Ni komencos per la novelo Vetiha de Julian Modest. Ĝi temas pri aktuala problemo kaj ĝia radikala "solvo", kiun verŝajne eĉ ne Pia Kjærsgaard kuraĝus proponi. Bonvolu trovu ĝin: www.esperanto.be/fel/mon/007140.html |
| 20. maj | Pro la Pentekosto ne estas programo. |
| 27. maj | Ni montros "La 12 seĝoj", rusan filmon kun esperantaj subtekstoj. Parto 1. |
| 03. jun | Ni montros "La 12 seĝoj", rusan filmon kun esperantaj subtekstoj. Parto 2. |

10. jun Peter Wraae montros fotojn de 10-a Himalaja Renkontiĝo en Nepalo ĉi jare.

Mi ekskursis en la orienta parto de Nepalo. Tie ni spertis tre belan naturon, malriĉajn homojn, malfacilajn vivkondiĉojn ĉe la limo de civilizo, malgrandajn esperanto-klubojn kun veraj idealistoj – kiuj ne havis spertajn instruistojn, sed tamen volis lerni esperanton.

17. jun Bent Jensenius denove gvidos studgrupon.
Novelo: *En la tombo* de *Nikolaj Afrikanoviĉ Borovko*
http://esperanto.net/literaturo/noveloj/01.html
kaj/aŭ la noveleto: *Tempo fuĝas* de *William Auld*
http://www.esperanto.be/fel/mon/002000.html

Somerferio. Ni rekomencos 12-an de aŭgusto 2013.

---

## Notico el Togolando




Okazis en Togolando kursoj tre sukcesaj gvidataj de italino, Paola Giommoni, kiujn ĉeestis salute ankaŭ aliaj esperantistoj, Christian Darbellay el Germanujo kaj ĉino Zhu Minghe. Ĉirkaŭ la kurso okazis aliaj agadoj, kiel intervjuoj en populara televid-programo.

*[landa agado]*

# Skisemajno 2013 en Aŭstrio



Dum jaroj mi partoprenis Esperantajn skisemajnojn, ĉiujare alilande. Tiuj skisemajnoj estis kaj ĉiam estas organizataj de Fervojista Esperanto-Asocio. Kelkajn jarojn mi bedaŭrinde ne povis partopreni, sed ekde 2009 mi rekomencis tiun al ni tre plaĉan sporton. Intertempe ni ĉiuj iom maljuniĝis kaj ni 3 el Danio decidis daŭrigon de skiado laŭ niaj kapabloj kaj bontrovo en bela kaj konata skiloko en Aŭstrio, nome Mühlbach. Hazarde la saman decidon faris la paro el Linz, Aŭstrio, kaj ni kompreneble renkontiĝis kun ili tie. Ĉar Erik kaj Astrid kiel membroj de la fervojista movado en la 90-aj jaroj jam 2 fojojn organizis Skisemajnojn en Mühlbach, la loko estas tre konata kaj ŝatata al ni.

La plej maljuna partoprenanto inter ni estas nia Erik Mortensen kiu en kelkaj monatoj atingos 88-an jaraĝon. Li komencis alpan skiadon kiel 43-jaraĝa, kaj de tiam ĉiujare aktivis. Sinsekve do li skiis dum 44 jaroj. Li akiris kaj bonan stilon kaj rapidecon kun kiu mi ne povas konkuri. Multajn premiojn li ricevis, kaj li ankoraŭ ne pripensas la ĉeson de la afero. Vere mirinde kaj grandan gratulon al nia Eriko!

Ni ĵus revenis de nia vojaĝo. La skiterenoj estis prizorgitaj kaj ni ĝuis ĉirkaŭaĵon kun belegaj montoj. En la apuda hotelo loĝis niaj amikoj kaj ni kune parolis Esperante. Entute ni estis 5 personoj de 3 diversaj landoj. Kompreneble la plej aĝa Eriko, aŭstra amikino Rosmari kaj Ana (estas mi), alpe skiis. Niaj du aliaj membroj, (Astrid kaj Johano), ĝuis la tempon alimaniere dum nia skiado. Vespere ni amuziĝis kune kun bonega manĝaĵo, bona vino kaj kartludo.

*Ana Røssum*

## Lillo gastigos la 100-an UK

La nordfranca urbo Lillo (Lille) gastigos la 100-an Universalan Kongreson de Esperanto en la jaro 2015. La Estraro de UEA decidis pri la loko de la jubilea UK en la lasta tago de sia kunveno, kiu okazis de la 22-a ĝis la 24-a de marto en la Centra Oficejo de UEA en Roterdamo. Inviton pri la okazigo de la 100-a UK en Lillo faris Unuiĝo Franca por Esperanto.

Lillo estas la ĉefurbo de la regiono, en kiu situas ankaŭ Bulonjo-ĉe-Maro. La urbo de la unua UK tamen ne havas la necesajn kondiĉojn por konsiderinde pli granda kaj ankaŭ laŭ sia programo alispeca evento ol tiu en 1905, dum la kongresejo *Lille Grand Palais* en la regiona ĉefurbo fariĝis populara ejo de plej diversaj grandaj kongresoj, foiroj kaj aliaj eventoj. Tamen, dum la 100-a UK okazos tuttaga ekskurso al la proksima Bulonjo-ĉe-Maro.

La Universala Kongreso de Esperanto estas unu el la plej longedaŭraj kongresaj tradicioj en la mondo. Kvankam tiu tradicio komenciĝis en 1905 kaj do estos jam 110-jara en 2015, la jubilea UK en Lillo portos la numeron 100, ĉar dum la Unua kaj Dua Mondmilitoj UK ne povis okazi. La 100-an datrevenon de la unua UK oni festis per la 90-a UK en la litova ĉefurbo Vilno en 2005.

*[gazkom uea]*

## Decembro en Bona Espero

Ludoviko Zamenhof, kiu multan tempon de sia vivo pasigis ĉe la lumo de kandeloj, vekiĝas sub la ruĝa ĉielo de matena krepusko. La suno, rapide leviĝanta, malfermas antaŭ liaj okuloj mirindan pejzaĝon de la brazila savano; la virga naturo en 360 gradoj da horizonto. La kreinto-Zamenhof rigardas, el sia unika en la mondo monumento, direkte al la majesta Monto Baleno, videbla detale en la kristale pura aero. Ĝi ne ŝajnas altega, malgraŭ sia alteco de preskaŭ 1600 metroj, ĉar Bona Espero situas 1300 metrojn super la marnivelo. Sed sur la 14-a paralelo de la suda hemisfero. Jen la sekreto de ĝia milda klimato, pro kiu la tuta regiono ŝuldas sian nomon Alta Paradizo.

Ĉiumatene mi kutimas saluti la Majstron kaj tuj kuras al la lago, por gimnastiki kaj naĝi. La lago ricevas sian akvon el la abunda fonto. Ĝi estas pumpata supren al la sidejo do Bona Espero per la antikva metodo sen uzo de energio. Tiu kurioza vidindaĵo estas nomata "ŝafofrapo". De la lago mi rekuras al la manĝejo, alarmita de sonorilo. Ĝi sonas kvarfoje tage: je la 8-a, 12-a, 15-a kaj 19-a horoj. La menuo estas kutime vegetara kaj sin bazas sur la propra, centprocente ekologia legomejo, kiu funkcias la tutan jaron. Sed ne ekzistas malpermeso pri viando. Oni povas bonguste viandumi en restoracioj de la proksima urbeto Alto Paraiso.

Laŭvole kaj daŭre ĉiu rajtas kompletigi sian menuon per fruktoj, plukeblaj rekte de arboj. Oranĝoj, citronoj, bananoj estas fruktoj konstantaj, aliaj aperas laŭ siaj natursezonoj: ĵabutikaboj, pitangoj, moruoj, guaranoj, avokadoj, gujavoj, gravioloj ktp. Gigantaj jakvoj kaj bongustegaj mangoj komenciĝas maturiĝi en decembro. Tiu monato estas aparte interesa. Tiam la savano transiras decide de la seka sezono al la pluva. Interesa observo-kampo por naturamantoj. Renaskiĝas la indiĝena flaŭro, kiu dum la tuta jarduono transvivis sen eĉ guto da pluvo.

Vekas min bruego de... ne de aŭtomobiloj, sed de birdoj, vekiĝintaj pli frue. Amaso de etaj kolibroj, kriemaj papagoj, grandbekaj tukanoj kaj aliaj birdoj, sennomaj por mi, ignoranto pri ornitologio. Rapide subiranta suno, bildigas la tutan ĉielon per fascina spektaklo de multkolora abstrakta pentroarto. Tiam mi pensas: *La belo estas vere sentebla, kiam oni povas ĝin dividi kun aliaj homoj.* Kaj mi aŭdas: *Do dividu ĝin. Venigu esperantistojn ne plu por volontule labori, sed por ripozi en mirinda naturo.* Tiel diras Ursula kaj Giuseppe Grattapaglia, kiuj jam preskaŭ 40 jarojn volontulas en Bona Espero, senlace kaj senenue.

Bona Espero eniras la fazon de restrukturiĝo. Dum la pasintaj 55 jaroj ĝia ĉefa celo estis edukado de infanoj kondamnitaj je analfabeteco. Dume okazis en Brazilo granda progreso sur la kampo de edukado. Tio ebligas al Bona Espero turni sian atenton al aliaj statutaj celoj. Venis la tempo transformi ĝin en internacian Esperantan Kulturcentron. Bona Espero ne intencas rezigni pri infanoj, ĉar sen ili ĝi ne estas imagebla. Sed oni prenas malgrandulojn de 5 ĝis 8 jaroj, kiuj estas pli efike edukeblaj. Same neimagebla estas Bona Espero sen esperantistoj, sed nun oni ne devas varbi volontulojn por longa estado, sed ĉiujn aliajn, kiuj volas fari mallongan viziton.

La nova celo estas, ke Bona Espero fariĝu vivanta peco de Esperantujo. En la tuta mondo ne ekzistas simila fenomeno. Jen la proprietaĵo de la Esperanto-movado leĝe konfirmita, je surfaco de 10 kvadrataj kilometroj, kun kompleta infrastrukturo kaj moderne ekipitaj konstruaĵoj, en la belega naturo. Esperantistoj, venu decembre por ripozi en tiu mistera mond-angulo. Kaj festi Kristnaskon kune kun Ursula kaj Giuseppe Grattapaglia, kiuj en 1973, do ekzakte antaŭ 40 jaroj unuafoje metis siajn piedon sur la promesitan teron... La festego estos ne-imagebla!

Estas du vojaĝvariantoj de la 6.12.2013 – 5.01.2014 kvarsemajna aŭ dum 20.12.2013 – 5.01.2014 – dusemajna. Krom Bona ESPERO eblas viziti Sao Paulo, la ĉefurbon Brasilia kaj Rio de Janeiro. En Bona ESPERO dum la tuta tempo mi gvidos festivalon de miaj Esperanto-filmoj, pri kiuj ni diskutos. Vojaĝu kun ni – aliĝu ĉe Esperantotur en Bydgoszcz, Pollando.

*Roman Dobrzyński*

| | | |
|---|---|---|
| *SUDA AMERIKO BRAZILIO Bona Espero !* | *06.12. 2013 ĝis 05.01. 2014* | *Varsovio - Sao Paulo - Brasilia - BONA ESPERO kun Filma Festivalo de red. Roman Dobrzyński - Rio de Janeiro - Varsovio<br>Prezo: 300 EUR + monata restado de 500 USD + de 1600 USD* |
| *SUDA AMERIKO BRAZILIO Bona Espero !* | *20.12. 2013 ĝis 05.01. 2014* | *Varsovio - Sao Paulo - Brasilia - BONA ESPERO kun Filma Festivalo de red. Roman Dobrzyński - Rio de Janeiro - Varsovio<br>Prezo: 300 EUR + dusemajna restado de 300 USD + de 1600 USD* |

**EN LA ARANĜOJ POVAS PARTOPRENI ĈIU INTERESITA.**

Ĉiujn pagojn sendu al la banka konto de Internacia Centro pri Kulturo kaj Turismo en Bydgoszcz:
Bank Pocztowy S.A. O/Bydgoszcz n-ro de la konto:
**PL80 1320 1117 2034 0100 2000 0001, SWIFT kodo POCZPLP4**.
Internacia Klubo "Esperantotur" – Internacia Centro pri Kulturo kaj Turismo, str. M.Sklodowskiej-Curie 10, PL-85-094 Bydgoszcz, Pollando, tel./fakso: (+48 52)3461151,
rete: esperanto-turismo@wp.pl, andreo@rubikon.net.pl,
info@esperanto.bydgoszcz.eu

# Esperanto-sumoo

1. Kio estas Esperanto-sumoo?

Sumoo estas japana tradicia lukto-arto. Ĝi okazas dum 15 tagoj, 6-foje jare. Paralele kun tiu konkurso ni organizas Esperanto-sumoo-n. En ĝi partoprenantoj promesas, ke ili legos iun libron kaj iun kvanton da paĝoj por unu tago. Kiam ili plenumas tiun promeson, ili akiras unu venkon. Tiamaniere ili legadas ĉiun tagon dum la 15 tagoj.

2. Kio okazis en la lasta sumoo?

En la 21a Esperanto-sumoo en marto partoprenis 120 homoj el la tuta mondo. Dum la 15 tagoj la sumo de legitaj paĝoj estis 8800. Esperanto-sumoo multe kontribuas al plialtigo de Esperanto-kapablo de la partoprenantoj kaj al Esperanto-libro-kulturo.

3. Partoprenu en la maja sumoo.

La venonta sumoo okazos ekde la 12a ĝis la 26a de majo. Se vi volas partopreni, sendu al mi: vian nomon kun sekso, luktistan nomon, retadreson, viajn urbon kaj landon, titolon de la libro kaj la kvanton da paĝoj, kiun vi legos por unu tago.

4. Pli da informoj:

Detalojn vi vidu en la suba retejo, en kiu vi trovos la historion, rezultojn, kaj kiujn librojn ni legis:

http://www.esperanto-sumoo.strefa.pl/index.html

HORI Jasuo (s-ro)

371-0825 Japanio, Gunma, Maebasi, Ootone 2-13-3

<hori-zonto@water.sannet.ne.jp>

# Esperanto ĉe Monda Socia Forumo

Bone okazis prezentado pri Esperanto dum la Monda Socia Forumo 2013. La ĉeesto de Esperanto en tiu Forumo estis iniciatita de la Komisiono pri Meza Oriento kaj Norda Afriko de UEA kaj subtenata de la organizaĵoj "Esperanto Internacia" kaj SAT-Amikaro. Dorota Parzyszek (poldevena tunizianino) estis la surloka organizanto de ĉio kaj multe laboris por konigi ĝin, interalie per evento kiun ŝi kreis en Vizaĝlibro, per afiŝoj gluitaj kaj broŝuroj disdonitaj helpe de Muriel Lefort (esperantistino el GEM, Grupo Esperanto de Le Mans, Francio). Estis de la 26-a ĝis la 30-a de marto 2013 laŭdire 60 000 partoprenantoj kaj miloj da organizaĵoj, budoj, debatoj kaj prelegoj, sur la giganta universitatejo de Tunizo, do malfacilis vidigi sin en tiu granda amaso.

Ni disponis pri salono, en kiu okazis prelego pri Esperanto, La lingvo de la printempo en la tuta mondo. Dorota enkondukis kaj vivigis la renkontiĝon. FaMo el Parizo kantis esperantlingve kun du tuniziaj amikoj muzikistoj. Ahmed Mansur el Maroko prelegis franclingve pri Esperanto. Ĉiuj aldonis detalojn kaj precizigojn responde al la demandoj de la publiko. Konklude Dorota prezentis librojn, revuojn kaj KD-ojn.

Ankaŭ helpis Jean-Jacques M'u, franca instruisto, libroeldonisto kaj esperanto-parolonto. Aldone li parolis pri esperanto dum 3 aliaj prelegoj kiujn li iniciatis kadre de sia eldonista laboro (ABC'éditions).

Certe partoprenis en la Forumo aliaj esperantistoj, ni ekzemple eksciis ke alia franca esperantisto el pariza regiono, ano de La Amikoj de La Paco ĉeestis. Malgraŭ la preskaŭ unupersona laboro surloka de Dorota, kiu ĉion iniciatis kaj pretigis, la atingo estis tre pozitiva. Partoprenantoj el Tunizio diris ke ili intencas lerni Esperanton, ĵurnalisto el radio Campus (Parizo) intervjuis, ktp. Fakte la komisiono de UEA pri Meza Oriento kaj Norda Afriko jam ricevis la unuajn kontaktojn de tunizianoj, kiuj jam lernas Esperanton. Por la Forumo 2015, necesus pli anticipe kunigi la ĉeestontajn fortojn. Tiel eblos pli efike konigi Esperanton per agoj pli videblaj kaj aŭdeblaj.

*FaMo, kun helpo de Renato Corsetti, Dorota Parzyszek kaj Muriel Lefort*

# Esperantistoj ordenitaj

La 25-an de marto 2013 la vojevodo de Grandpolio Piotr Florek dekoraciis du estraranojn de la Federacio Eŭropo–Demokratio–Esperanto – la vicprezidanton Eŭgeno Macko kaj la sekretarion Stanislao Rynduch – per la Kavalira Kruco de la Ordeno de Merito por Respubliko Pollando.

La 13-an de marto Otto Prytz, akademiano kaj multjara vicprezidanto de Norvega Esperanto-Ligo, ricevis hispanan reĝan ordenon pro sia instruado de la hispana lingvo ĉe la Universitato de Oslo dum sia tuta profesia vivo. Dum la transdona ceremonio ĉe la ambasadoro oni menciis lian engaĝiĝon por Esperanto, kaj aŭdiĝis kelkaj Esperantaj frazoj.

*[La Balta Ondo]*

# Senata Ekspozicio en Pollando

La 15-an de marto 2013 la Senata Ekspozicio "125 jaroj de la lingvo Esperanto", post pli frua prezentado en Varsovio, Malborko, Nowy Staw, kaj Tczew alvenis al Gdynia.

La malfermon de la ekspozicio honorigis per sia ĉeesto Senatano prof. d-ro hab. Edmund Wittbrodt kaj direktoroj de la oficejoj de parlamentanoj: Teresa Hoppe kaj Marek Biernacki.

Senatano E. Wittbrodt dum sia parolado substrekis, ke sen la entuziasma engaĝiĝo de Kazimierz Krzyżak kaj Edward Kozyra ne ekestus ebleco fondi la Parlamentan Grupon Apogantan Esperanton (kies prezidanto li estas) kaj kiu kune kun la Ambasado de Eŭropa Komisiono en Pollando intencas organizi kaj partopreni en la 8-a de majo, la Tago de Eŭropo, simpozion, dediĉita al la lingvo Esperanto, en kiu ĉeestos ankaŭ la diplomatoj (esperantistoj) de landoj de Viŝehrada Grupo, interalie Jozef Reinvart el Slovakio, krome partoprenos reprezentanto de la aktuala irlanda Prezidanteco de Konsilio de UE – la irlanda diplomato Seán Ó

Riain, kaj ankaŭ grupo da polaj Membroj en la Eŭropa Parlamento inter-alie Jerzy Buzek, Jan Kozłowski, Tadeusz Cymański kaj Joanna Skrzydlewska. En la simpozio partoprenos ankaŭ reprezentantoj de la Estraro de Pola Asocio Eŭropo-Demokratio-Esperanto.




La supre menciitajn okazaĵojn oni devas agnoski kiel epok-farantajn por la pola Esperanta movado. Ili kreas esperon por la pola esperantismo – eliron el la ĝisnuna sorĉa rondo de katakomba, do malefektiva agado, kiu kaŭzas malnombriĝadon de adeptoj de tiu mirakla zamenhofa eltrovo kaj mankon de baza informo pri Esperanto en la pola socio.

Dank- kaj respekt-vortojn ni direktas al Direktorino de la Centro de Seniora aktiveco en Gdynia – s-ino Bożena Zglińska, kiu en modestaj ejoj de tiu Centro kapablis certigi efektan prezentadon de tiu ĉi interesa ekspozicio kaj la solenan inaŭguron – grandan dankon S-ino Direktorino.

*Kazimiro Krzyżak kaj Eduardo Kozyra*

# Vojaĝo Angkor-Esperanto



Libera vojaĝgrupo aŭ Vojaĝo Angkor-Esperanto estas memorganizita vojaĝgrupo al Kamboĝo.

1. Membroj de vojaĝgrupo povas esti esperantistoj, ankaŭ iliaj familianoj, parencoj, amikoj aŭ kolegoj, sed en ĉiuj vojaĝgrupoj devas troviĝi almenaŭ unu esperantisto, ĉar nia laborlingvo estas nur en Esperanto.
2. Membroj de ĉiuj vojaĝgrupoj devas superi 10 kaj malsuperi 20 partoprenantojn. Grupestro devas esti elektita en ĉiu vojaĝgrupo, la grupestro respondecas pri la planado, organizado kaj administrado de sia vojaĝgrupo.
3. Por libera vojaĝgrupo ne troviĝas limdato kaj limloko. Kien vi volas iri, tien vi povas iri; kiom longe vi volas resti ie, tiom longe vi povas resti tie. Vi povas memaranĝi vian vojaĝadon, sed vi mem devas porti ĉiujn riskojn kaj devojn dum via vojaĝado.
4. Ni sendas al ĉiuj vojaĝgrupoj unu lokan esperantiston kiel interpretiston, gvidiston kaj konsiliston dum via vojaĝo en Kamboĝo,

li(ŝi) helpos pri manĝoj, loĝado, veturado, vizitoj, aĉetadoj kaj amuzado en Kamboĝo (inkluzive de akceptado kaj sendado ĉe la flughaveno). Por ĉi tiu servado, ĉiuj membroj de la vojaĝgrupo devas pagi al ni 10 usonajn dolarojn (sed ĉi tiu pago devas esti traktita).

**5.** Nunaj normoj de manĝado, loĝado, veturado kaj vizitado en Kamboĝo:

(1) Manĝado: ĉiutage ĉ. 9 usonajn dolarojn por unu persono en malgranda manĝejo.

(2) Loĝado: ĉiutage ĉ. 15 usonajn dolarojn por unu dulita ĉambro en komforta gastejo.

(3) Veturado: ĉiutage ĉ. usonajn dolarojn por unu 'Romork', 4 personoj povas sidi en ĝi.

(4)Vizitado: Enira bileto al Angkor kostas 20 usonajn dolarojn, Kultura vilaĝo kostas 10 usonajn dolarojn, Lago Tonle Sap kostas 5 usonajn dolarojn.

* Noto: Ni ankaŭ povus aranĝi vian vojaĝgrupon por viziti vidindaĵojn en Kamboĝo…

** Infano malpli ol 9-jara en Vojaĝgrupo estas senpaga.

Kontaktu: Sreng Teklong ĉe ankoresperanto@yahoo.com

| Regiono vizitinda | Detaloj | Membroj/ Tagoj | Prezo |
|---|---|---|---|
| Urbo Pnompeno | Estas la ĉefurbo de Kamboĝo, KEA, Sendependeco Monumento, kazino-hotelo, Boato, Muzeo pri Genocido, Mortigejo, Palaco kaj Arĝenta Pagodo. | Ĉiu vojaĝgrupo devas superi 10 kaj malsuperi 20 personojn kaj ni bezonas 5 aŭ 7 tagojn por viziti mian landon. | Ĉiu membro de vojaĝgrupo devas pagi al ni 10 usonajn dolarojn. |
| Siem Reap (Angkor) | Angkor wat templo, Angkor Thom templo, Angkor Silko-farmo, Monto Bakeng, Kultura Vilaĝo, Lago Tonle Sap, Nokto Bazaro, Kmer tradicia danco. | | |
| Sihanukville | Estas la plej bela maro kaj estas la insulo de la mondo,… | | |
| Krome | En Kamboĝo estas multaj vizitindaĵoj en diversaj provincoj… | | |

# La Famaj vizitindaĵoj de provinco Siem Reap

1. Templo Angkor Wat




2. Templo Bayon





3. Templo Banteay Srei





4. Kultura Vilaĝo





5. Lago Tonle Sap





6. Monto Kulen





7. Nokta Bazaro






# *Fotoj el la jarkunveno 2013*

*Jen kaptitaj en unu bildo: la prezidinto de KEK, la prezidanto de KEK kaj la gastpreleganto el Skotlando, Ed Robertson,*





*La distradon prizorgis la juna generacio (parte treege juna)*

*Jonas junas, Mathias pli junas, kaj ne mankas tiuj kiuj plej junas...*

